

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

Vin vokas Västerås 2
Frostavallen — Sveda
Somera Semajno 3
Okulkuracisto instigis junulon
lerni Esperanton 5
Portland 6
Daka-Roma deveno de
la rumana popolo 7
Larmoj sur rokoflanko 10

Abono 20 sv. kr.

Poŝtgiro: SEF 20 12-3

1

1972

60-a jaro



Västerås estos la loko por la jarkongreso de SEF dum Pentekosto 1972. Jen la Urbodomo.

Semajno de Internacia Amikeco, 20—27 februaro.
Sendu salutojn al viaj amikoj. Vidu paĝon 8.

LA REDAKTORO:

Tiu ĉi numero estas la unua de la 60-a jarkolekto de La Espero. Kvankam la vera datreveno okazos nur post unu jaro — la unua numero aperis en februaro 1913 — la nombro 60 tamen devas instigi nin fari ĉion eblan por ankoraŭ plibonigi nian gazeton.

Pri tri gravaj eventoj okazontaj dum la jaro vi povas legi en tiu ĉi numero: la Universala Kongreso en Portland, la Jarkongreso de SEF en Västerås kaj la Sveda Somera Semajno en Frostavallen. Tiu lasta sendube estos unu el la plej gravaj eventoj en la esperanto-mondo dum la jaro. Partoprenos i. a. la prezidanto de UEA.

Ni esperas, ke vi mem trovos eblecon partopreni en unu aŭ du el tiuj aranĝoj, sed apartenas kompreneble al nia tasko informi tiujn, kiuj ne povos ĉeesti, pri la plej gravaj okazaĵoj kaj debatoj.

Ni ankaŭ provos daŭrigi la publikigon de artikoloj pri diversaj temoj, kiuj povas interesi niajn legantojn. Jam en la sekvonta numero aperos espereble artikolo pri la kvadrato de la cirklo — ne tiel speciala kiel vi eble kredas — kaj pli poste venos nova artikolo de Hugo Löfgren. Ni danke akceptos aliajn kontribuojn de tiu speco, kvankam kelkfoje daŭros iom da tempo antaŭ ol ni trovos spacon por publikigo.

Inter niaj literaturaj manuskriptoj jam troviĝas kelkaj tradukoj el la rumana literaturo kaj originalaj verkaĵoj de i. a. bulgaraj kaj hungaraj samideanoj. Ni tamen tre ĝojas, ke ni en tiu ĉi numero povas publikigi novelon de sveda esperantisto — Gösta Rosenberg. Ĉar ĝi estas iom longa, vi trovos la finon en la sekvonta numero. Ĝi pritraktas interesan temon, kaj ni forte rekomendas al vi legi ĝin.

Kiel ni jam pli frue anoncis, ni tre ĝojas ricevi kontribuojn de niaj legantoj: raportoj el la kluba vivo, proponoj kaj sugestoj de ĝenerala intereso por la movado, k. t. p. Skribu, sed skribu mallonge! Esprimi siajn pensojn per malmultaj vortoj estas malfacile, preskaŭ arto, sed por gazeto kiel la nia kun limigita spaco tiu estas nepra kondiĉo por ke la enhavo estu kiel eble plej varia.

Gösta Rosenberg

JAN.-FEB. 1972


Numero 1. 60-a jaro

2

V I N V O K A S V Ä S T E R Å S

La ĉi-jara jarkongreso de SEF okazos dum pentekosto (20—22 de majo) en VÄSTERÅS, la malnova historia urbo kaj grava, moderna industriurbo apud la lago Mälaren. Tio signifas, ke por la dua fojo en kelkaj jaroj SEF jarkongresos en urbo, kie esperantosocieto ne ekzistas (la unua fojo estis en Jönköping en 1970).

Tamen troviĝas esperantistoj tie, kaj unu el ili sub la pseŭdonimo "Loso" verkis la jenan artikolon. Pro la centra situo de la urbo Västerås espereble venos multaj partoprenantoj kaj espereble la jarkongreso iel kontribuos al pliviglo de la esperantoagado tie.



Västerås havas ankaŭ gravan havenon.

Västerås situas kie la rivero Svartån elfluas en la lagon Mälaren. La nomo Västerås estas kuntiraĵo de Västra Aros (= Okcidenta riverbuŝo), kaj ofte oni nomas la urbon tutsimple Aros. Jam ĝi famiĝis pro kulturado de kukumoj, sed tio jam antaŭ longe ĉesis.

La aĝon de la urbo oni ne certe scias, sed ĝi havis episkopon jam dum la 12a jarcento. La katedralo ĉijare solenas sian 700-jaran jubileon, sed la 103 metrojn alta turo, kiu levas sin ĉielen kiel granda montrofringro, estis konstruata dum la lastaj jaroj de la 17a jarcento. Ĝin desegnis la fama arkitekto N. Tessin la pli juna. En la katedralo oni trovas la tombon de la malfeliĉa reĝo Erik XIV. Ties patro, Gustav Vasa, aranĝis du parlamentajn kunvenojn en Västerås. Plej konata estas la t. n. reformacia parlamento en 1527. Ĝi kunvenis en la dominikana monaĥejo, kiu poste estis malkonstruata. Oni forgesis la precizan lokon de la monaĥejo, ĝis kiam antaŭ kelkaj jaroj oni trovis la fundamentojn, fosante por konstrui la novan grandegan urbdomon. Tiam oni markis la lokon de la malnovaj muroj per ŝtonpavimado en la planko de la enirhalo kaj sur la korto.

Västerås havas multajn historiajn memoraĵojn. La unuan svedan gimnazion fondis ĉi tie la episkopo Joh. Rudbeckius dum la 17a jarcento. Stranga vidindaĵo estas Djäkneberget meze en la urbo. Tie kapitano Sam Lidman — parenco de la verkisto kaj predikanto Sven Lidman — enhakis multajn enskribaĵojn sur ŝtonojn por inspiri siajn samtempulojn al bonaj moroj kaj memori pri historiaj personoj kaj okazaĵoj.

Sed Västerås estas ne nur historio. Ĝi estas urbo kiu vere vivas en la bolanta nuno. Malmultaj lokoj en nia lando kreskis tiel rapide kiel Västerås. Tion kaŭzis grandparte la du grandaj industrioj ASEA kaj Svenska Metallverken (nun Gränges Ess- em). ASEA estas nia plej granda elektra entrepreno kun eksporto al la tuta mondo. La industrioj altiris multajn homojn el aliaj partoj de Svedujo kaj el aliaj landoj. Ĉi tie vivas miloj da eksterlandanoj, kaj la meza aĝo de la enloĝantoj estas malalta.

Västerås estas moderna urbo kun longa historio, urbo kiu certe estas inda celo por vizito. Vi havos ŝancon kombini tian viziton kun partopreno en la jarkongreso de SEF 1972.

Loso

UTILAJ INFORMOJ

Ĉar en Västerås nuntempe ne funkcias esperantoklubo, la kongreskomitatanoj laboron faras la federacia estro-raro mem, kun helpo de kelkaj sindonaj personoj.

La detala programo ne estas fikcia, sed la jenon ni jam scias:

La malferma kunveno okazos en la pompa salono "Rikssalen" en la kastelo de Västerås.

La laborkunsidejo okazos en la Urba Hotelo, kie la kongresanoj ankaŭ loĝos, manĝos kaj festos.

Kiel kutime la jarkunsidejo de SEF okupos la ĉefan parton de la programo. Ni intencas ankaŭ aranĝi prelegon de konata eksterlanda esperantisto pri informado, kaj poste sekvos gruplaboroj pri tiu temo.

La kongresa komitato petis pri speciala poŝtstampo por la kongreso.

Neniu longa ekskurso estas planita, sed ni intencas aranĝi viziton al la fama "Djäkneberget" en la urbo mem.

Prezoj: La kongreskarto kostas 25:— kronojn, por ĝeĵunuloj en SEJU 10:— . Vi povas mendi "kongrespakaĵojn" je la prezo de 134:— por du-lita ĉambro kaj 154:— por unulita. Tiu inkludas 2 tranĝojn, 2 matenmanĝojn, supeon en la pentekosta vespero, lunĉon kaj supeon en la pentekosta tago. La prezoj por la eroj estas: ĉambro 30:— (40:—) po nokto, matenmanĝo 6:50, supeo 25:—, lunĉo 21:—, tesupeo 15:—.

Fervoja rabato: Ĉar tro malmultaj uzis kongresrabanon pasintjare (nur 15 biletoj) ni ne ricevis la saman favoran rabatsistemon ĉi-jare. Tamen, se minimume 15 personoj veturos per trajno kaj antaŭmendas la bileton ĉe la kongreskomitato ni havos la eblecon aĉeti la biletojn je rabatprezo (25% malaltigo) kaj sendi ilin al la mendintoj kune kun la kongresdokumentoj.

Aligoj: Ĉi-jare aliĝiloj ne sekvos kiel aldone al La Espero. La komitato sendos aliĝilojn al ĉiuj kluboj. Vi povas ankaŭ mendi ilin rekte de Svenska Esperanto-Förbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm. En la aliĝiloj ĉiuj prezoj estas indikitaj.

Se necese vi povas telefoni al numero 08-37 27 00 (tage) aŭ 52 76 67 (vespere) Ragnar Hjorth.

Nepre aliĝu antaŭ la 30-a de aprilo! Post tiu dato ni ne plu povas garantii hotelĉambrojn.

Kom i år till FROSTAVALLEN

Frostavallen ligger mitt i Skåne — i närheten av Höör — i ett idylliskt skogsområde med utmärkta strövområden, som på vintern passar bra för skidåkning och på sommaren för promenader. I närheten finns en insjö med badmöjligheter, och där har man också en av ingångarna till Skånes Djurpark. Skid- och friluftsförbundet har anlagt Frostavallen, som nu förvaltas av en stiftelse. Den verkligt hemtrevliga Gästgården finns kvar men nu sammanbyggd med det nya, moderna hotellet i fyra våningar (färdigt 1971). Ytterligare nybyggnader väntas.

Svenska Esperanto-Institutet har under 1950- och 1960-talen på Frostavallen haft högklassiga seminarier kring aktuella ämnen med varje gång framstående föreläsare inför deltagare från många olika nationer. Det har också blivit tid för givande diskussioner rörande Esperantorörelsen och dess organisation. Vi har ju alla hört talas om "La Principaro de Frostavallen".

I år rör sig föredragen kring ämnet:

"LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO EN LA MODERNA MONDO
— Kun speciala atento al la situacio en Eŭropo."

Föredragshållare:

Prof. Dro **Ivo Lapenna**, England, ordf. i UEA.

Dro **W. Bormann**, Tyskland, ordf. i Väst-Tysklands Esperantoförbund och medlem av UEAs styrelse.

Dro **J. C. Wells**, England, ordf. i Englands Esperantoförbund och medlem av UEAs styrelse.

S-ro **Jean Thierry**, Frankrike, tid. ledamot av UEAs styrelse.

(Samtliga föreläsare/lärare vid universitet o. likn. och med åtskilliga specialuppdrag inom Esperantorörelsen utöver ovan angivna.)

Ni skall absolut göra Er ledig för att "på hemmaplan" få vara med om en mycket intressant vecka (den följer omedelbart efter kursveckan i Helsingör, där säkerligen många tänker delta).

Årets världskongress blir borta vid Stilla Havet (i Portland). Ni som ej kan vara med där, får ändå tillfälle att samma vecka diskutera med UEA:s ordf. och flera styrelseled. i UEA — på Frostavallen.

Gör slag i saken. Bestäm Er NU för årets vecka. Skriv efter upplysningar och anmälningsblankett hos: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.

Och glöm ej: Anmäl Er sedan så fort som möjligt.

Vi ses!

P. S. I år har Ni möjlighet delta i en Sveda Somera Semajno på Frostavallen. Ingen vet, om och när en sådan vecka kommer nästa gång. Det är i c k e ett årligen återkommande arrangemang.



Frostavallens hemtrevliga storstuga (bilden) är välkänd för tidigare deltagare i Svenska Esperanto-Institutets seminarier. Nu finns där även ett nybyggt hotell.

Diskuto en UN-asocio

Cu la celo estu diskutigi aŭ informadi? Tiel oni povas resumi diskuton en la kroma kunsido de la sveda UN-asocio (Svenska FN-förbundet). Ĝia reprezentantaro kunsidis en Stockholm fine de novembro.

La UN-asocio havas kiel membrojn ne nur lokajn klubojn sed ankaŭ aliajn landajn organizaĵojn, inter alie SEF. Ĝi ricevas konsiderindajn sumojn de la ŝtato por sia informlaboro, kaj eldonas informmaterialon por lernejoj kaj kluboj. En ĝia estraro, unu membro estas elektita de la registaro. La parlamento esprimis la opinion ke la UN-asocio estu la centra organo por UN-informado en Svedujo.

Sed en la UN-asocio nun komenciĝas diskuto pri ĝia rolo — pri la enhavo de la informado, pri la celoj de la organizaĵo kaj pri la rolo de la grandaj organizaĵo-membroj.

La diskutoj centriĝis ĉirkaŭ du opinioj. Je unu flanko ekzistas la postulo ke la UN-asocio aktive laboru por internaciigi la homojn en Svedujo. Je alia flanko estas la timo ke la organizaĵo disrompiĝos, se oni levas demandojn kiuj ne estas partipolitike neŭtralaj.

Ekzistas en la hodiaŭa mondo kelkaj grandegaj kaj urĝaj problemoj, kiuj estas kunligitaj: evolulandaj problemoj kaj problemoj de malpurigo de la medio (aero, akvo ktp). La demandoj estas tre grandaj kaj abstraktaj, kaj tial ŝajnas al la homoj ke oni ne estas tuŝata de la problemoj, kaj ke la problemaro estas fora.

En la UN-asocio, unu flanko de la opinioj volas konkretigi tiujn ĉi problemojn al la homoj. Oni volas ke la UN-asocio stimulu al debato pri la problemaro, donu materialon por tiuj debatoj, kaj tiel kreu komunan fonton da scioj inter la homoj. Por stimuli al debato, oni devas doni diversajn vidpunktojn, ankaŭ kontraŭajn kaj politike neneŭtralajn, pri la temaro.

Kontraŭ tiu ĉi flanko en la UN-asocio estas la opinio ke gravas reteni la unuecon de la asocio. Tiu ĉi vidpunkto devenas el konscio pri la strukturo de la UN-asocio. Se organizaĵo konsistas parte el unuopaj membroj kaj lokaj kluboj, parte el aliaj tutlandaj organizaĵoj, tiam troviĝas jam en la strukturo la risko por kontraŭstaroj.

Ankaŭ tiu ĉi flanko volas informadi al homoj kaj influi al iliaj pensoj. Ili tamen volas limigi sin al informado pri la agado de UN, kaj eviti tiajn demandojn kie ekzistas diferencaj opinioj inter la politikaj partioj.

Kiel oni vidas, tamen ne ekzistas profunda malinterkonsento pri la agado de la UN-asocio. La punkto de interkonsento troviĝas en tio, ke se oni eldonas materialon kun diver-

Imitinda kunveno en Oslo

En novembro pasintjare mi havis okazon ĉeesti kunvenon de la Esperantoklubo de Oslo. La klubo festis sian 55-jaran jubileon en iom neordinara maniero. La temon por la renkontiĝo oni eble povus nomi "Esperanto kaj kulturo".

En sia salutparolo la prezidantino de la klubo, Anne-Lise Reed, i. a. diris, ke la klubo kutimas ĉiun jaron atentigi pri La Tago de la Unuigintaj Nacioj, kaj tion oni pli frue faris per ia programo inter la klubanoj. Sed ĉi-jare oni anstataŭ invitis reprezentantojn por la lokaj UN-organizaĵoj partopreni la jubilean kunvenon de la klubo, kaj kelkaj el ili ankaŭ alvenis. "La ideoj kaj celoj de la Esperantomovado multe similas al tiuj esprimitaj en la deklaro de UN pri la Homaj Rajtoj," diris s-ino Reed, "kaj tial estas por ni nature serĉi kunlaboron kun la UN-organizaĵoj por informi ilin pri nia laboro."

Poste ŝi bonvensalutis la ĉefparolanton de la vespero, Kulturrådman Dagfinn Austad (proksimume: kulturministro de la urbo Oslo). En agrable facila maniero li donis informojn pri la kultura budĝeto de la ĉefurbo. Li petis pri la opinio de la aŭskultantoj je diversaj punktoj kaj el tio sekvis interesa diskutado. S-ro Austad eĉ donis promeson pri monhelpo por certaj agadbrancoj de la klubo. Ricevinte tradukitan libron pri Vigeland li ŝajnis vere impresita.

En paŭzo ni povis trinki kafon, rigardi librekspozicion, aŭskulti muzikon. Poste s-ro John Berggreen parolis (en la norvega) pri "Lingvoj kaj kulturo".

Ŝajnas al mi, ke tia kontakto inter la esperantistoj kaj la kulturaj instancoj estas tre valora ambaŭdirekte. La kunveno estis tre sukcesa. Pli ol 60 personoj ĉeestis.

Nun kelkaj vortoj pri tute alia afero: En 1975 okazos en Lillehammer en Norvegujo la granda skolta mondjamboreo. John Berggreen estas prezidanto de la skolta esperantomovado kaj li energie laboras por starigi studrondojn inter la skoltoj. Ni ĉiuj, skoltoj aŭ ne, devas esti pretaj kunhelpi en tiu agado. Estas necese jam nun komenci por havi bonan rezulton.

Märtha Andréasson

saj vidpunktoj pri la grandaj problemoj de la hodiaŭo, oni povas fari ĝin tiel ke estas klare videble, ke la UN-asocio mem ne prenas starpunkton.

Rezulto de la diskutado estis decido fari laborgrupon kiu reviziu la celon laŭ la statuto, kaj faru proponojn pri certaj organizaj demandoj.

Ulla Luin

Tamen internacia kongreso en Svislando

Abundas demandoj de kongresemaj esperantistoj kaj de UEA, kial ne plu Universala Kongreso en Svislando deponi 1947? Spite de preteco de svisaj esperantistoj organizi tian, mankas tutsimple loĝeblecoj dum julio kaj aŭgusto. Tuta Svislando — la lulilo de la turismo — estas elvendita dum feria tempo.

Feliĉe ni povas inviti vin al internacia kongreso de la plej granda faka asocio esperantista, kiun partoprenas kutime 500—800 personoj kaj kiu jam atingas bonfamom. **La 24-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio de la 6-a ĝis 12-a de majo 1972 okazos en Lugano.** Spontane la trafikoficejo de tiu urbo eldonis prospekton en la internacia lingvo. Lugano jam bonfamas kiel feria loko, ĝi troviĝas inter la plej konataj eŭropaj. Dum printempo, kiam ankoraŭ dormetas la naturo. Tiĉino kaj Lugano prezentas dank'al sia klimato la printempon en plej alloga vestaĵo. La kongreso servos al fervojistoj kaj al nefervojistoj tutsame.

1972, en jaro kiam la UK okazos en Usono, por multaj regulaj kongresanoj neatingebla, prezentigas por vi unika okazo. Konsciu bone, ke dum majo vi vojaĝas multe pli komforte en trajnoj kaj sur aŭtoŝoseoj ol dum feria tempo. Konsciu ke hoteloj kaj restoracioj ne estos supersarĝitaj kaj pro tio prezentos al vi bonajn servojn.

Informojn kaj aliĝilon: 24-a Esperanto-Kongreso IFEF, Via Monte Ceneri, CH-6512-Giubiasco, Svislando.

SAT-kongreso en Kuopio en 1972

Sennacieca Asocio Tutmonda — SAT — aranĝos sian jarkongreson 1972 en Kuopio en Finnlando dum la semajno 22—28 de julio. Loka aranĝanto estas la Esperantoklubo de Kuopio, "Lingvoponto".

La urbo Kuopio situas en la orienta parto de Centra Finnlando sur bela duoninsulo je la konata monteto Puijo. Kuopio havas multajn vidindaĵojn: viglan vendoplacon, la Puijo-turon kun rotacianta restoracio, la muzeon de la ortodoksa eklezio — la plej unika en okcidenta Eŭropo — kaj tre belajn ĉirkaŭaĵojn. La SAT-kongreso enhavos diversajn fakajn kunvenojn, amuzajn vesperojn, ekskursojn al diversaj interesaj lokoj en la provinco Savo ktp. Moderaj prezoj. Informojn vi petu de **SAT-kongreso, p/a Lingvoponto, p.f. 119, 70101 Kuopio 10, Finnlando.**

STIPENDIO DE ESPERANTOSTIFTELSEN

Tiuj kiuj intencas partopreni en la Someraj Universitataj Kursoj en Liège 1972 povas peti stipendion ĉe Esperantostiftelsen, adreso ĉe s-ro Erik Carlén, Yxhult, 690 60 Hällabrottet.

Oni disdonos unu stipendion, kaj la stipendiito devas esti malpli ol 30-jara.

Limdato por la peto: La 1. marto 1972.

NORDA PRISMO 4/1970

Post longa, seninforma atendado la legantoj de NP subite ekĝojis pro alveno de no 4/1970. Pro malsano de funkciuloj NP ne aperis dum 1971.

Kun bedaŭro mi timis ke tiu grava revuo eble estus mortinta. Feliĉe ne, sed verŝajne ĝia estonto ankoraŭ ne estas tute sekura. Ni tamen esperu.

La administranto proponas ke la abonkondicioj de 1971 validu por 1972. Ankaŭ eblas repago. Mi esperas ke neniu utiligos la lastan alternativon. Por helpi daŭran eldonadon de NP estus konsilinde pagi jarabonon ankaŭ por 1972.

Tre riĉa, interesa kaj varia enhavo. Ĝenerale flua, bona lingvo. Brila poemtraduko de H. Drezen, klarstila artikolo pri frua esp.-poeto Schulhof ktp. ktp.

Ofte esperanta transskribo de nomoj strange impresas kaj ofte konfuzas. ALANDIO pretendas komprenigi pri Åland. Legante la nomon OSKARO VAJLDO mi pensis ke temas pri balta verkisto — sed: Oscar Wilde. Kaj KATULO celis nek Marjorie Boulton nek Raymond Schwartz sed Catullus! (Ekz. el NP).

S. A. J.



GAVOR FRÅN HALMSTAD

Halmstads Esperantoklubb har anslagit 500 kr. till Svenska Esperanto-Institutet som bidrag till kostnaderna för Sveda Somera Semajno 1972, en välkommen gåva eftersom nettokostnaderna för Frostavallen-veckan kommer att avsevärt överstiga det utlovade statsbidraget.

Halmstadsklubben har vidare beslutat fördela 700 kr. till ungdomar, som under 1972 deltagar i något esperantoarrangemang. Se annons. SEF-styrelsen tackar varmt för bidragen!

OKULKURACISTO INSTIGIS JUNULON LERNI ESPERANTON

Dum libertempa vizito al Israelo mi kaptis la okazon kontakti samideanojn en Jerusalemo, Tel Aviv kaj Natanya.

Dimanĉan posttagmezon mi kaj mia edzino estis invititaj trinki kafon ĉe la konata jerusalema esperantisto Josef Kohen-Cedek. Kvankam la vojo ŝajne estis facile trovebla laŭ la mapo, ni trovis necese demandi trifoje personojn surstrate, ĉiufoje en alia lingvo (angle-germane-france) antaŭ ol ni alvenis al la celo, Keren-Kayemet strato 41.

Tre kore bonvenigitaj de nia gastiganto en ĉambro plena de libroj ni tuj sentis hejmecean atmosferon kaj la reciproka prezentado de niaj personoj estis baldaŭ farita. Montriĝis ke sinjoro Kohen-Cedek kiel junulo loĝis en Vilna, Litovujo kaj ni loĝas en Vargön, Svedujo. La nomoj de tiuj lokoj hazarde ambaŭ signifas "Ejo de lupoj". Per tio ni havis ankoraŭ unu ligilon inter ni — krom Esperanto.

Inter la multaj interesaj travivaĵoj kiujn nia multospertinta amiko rakontis, mi elektas jenan kun la espero ke mi povos redoni ĝin fidele:

Okazis foje antaŭ la unua mondmilito ke la juna Josefo estis promesata ricevi biciklon je sia baldaŭ okazonta 16-jartago. Antaŭ la alveno de la granda tago de "la unua biciklo en mia vivo" li eksciis, ke la patro intencis vojaĝi al Varsovio por konsulti okulkuraciston. Ĉar Josefo ĝis tiam ne vidis pli grandan urbon ol Vilna, la penso pri ebla vizito al la grandurbo Varsovio kreskis de tago al tago. Kaj jen li estis preta proponi al sia patro anstataŭigon de la biciklo per vojaĝo al Varsovio. La patro iom hezite akceptis la proponon, ĉar li opiniis ke la knabo per

tio faras malbonan negocon. Sed la junulo persistis kaj la vojaĝo okazis.

Kiel vi kiel inteligenta leganto jam divenis, la patro kaj la filo alveninte Varsovion tuj direktis sin al la okulkuracista akceptejo de doktoro Zamenhof. Tiu nomo kaj persono estis pli frue konata de la patro, sed al Josefo tute fremda. La patro konsultis la kuraciston kaj dume la filo atendis en la antaŭĉambro pasigante la tempon — kiel kutime — per foliumado de malnovaj gazetoj kaj presajoj. Kaptis tiam lian intereson kajero, kiu prezentis lingvon kiu estis tute nova al li, nova sed tamen iamaniere bonkonata kaj facile komprenebla. Li jam estis riĉe dotita per lingvoscio parolante krom litove, ruse, jido kaj iom pole ankaŭ la lerneje studitajn germana, latina kaj cetera. Fininte la konsultadon la doktoro akompanis sian klienton al la antaŭĉambro, kie li ekvidis la knabon studenta la esperanto-broŝuron, kiun li estis metinta propagandacele inter aliajn legajojn. Nun estis lia vico konsulti la novinteresiton pri lia opinio rilate la prezentitan lingvon. Estiĝis vigla interparolo inter la du lingvospertuloj. Kaj la finon de la historio vi nun scias... S-ro Kohen-Cedek migris al Palestino kaj kiel pioniro eklaboris inter aliaj entuziasmaj enmigrintoj por krei la judan ŝtaton, kiun nun finfine fariĝis realigita revo. Dume li havis tempon sin dediĉi ankaŭ al la disvastigo de Esperanto kaj verki en kaj pri ĝi en multaj gazetoj. Unu el liaj plej novaj verkaĵoj estas "La lando Golan kaj ĝiaj trezoroj", arkeologia artikolo aperinta en la Biblia Revuo.

Aliaj travivaĵoj dum la dusemajna restado en la ege interesa lando eble sekvos en iu venonta numero. Sam

NI HAR RÅD . . .

vara direkt medlem av UEA. I föregående nummer av La Espero lämnades uppgifter om UEA-avgifterna för 1972.

Ni har råd att ha både årsbok (två delar) och tidningen ESPERANTO (varje månad).

Det kostar endast 43: — kronor, som betalas till postgiro-konto 14 74 29-5 Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

VANTA INTE LÅNGRE — BETALA ER ÅRSavgIFT I DAG!

PORTLAND

La 57-a Universala Kongreso okazos ĉi-jare en Portland, en la ŝtato Oregon en okcidenta Usono. Por ni skandinavoĵoj la distanco estas tre longa, kaj multaj gesamideanoj kiuj kutimas viziti la kongresojn eble jam rezignis kaj anstataŭ partoprenos iun eŭropan aranĝon.

Tamen, tiuj kiuj veturos al Portland — kaj la afero eble ne estos tiel multekosta kiel multaj kredas — certe ĝuos eksterordinaran travivaĵon, ĉar Portland situas en unu el la plej belaj kaj interesaj regionoj de la norda parto de la amerika kontinento. Jen kio vin atendas:

En la jaro 1845 du viroj devis elekti la nomon por la urbo: ili decidis per jeto de monero. Unu devenis el Boston en ŝtato Massachusetts, la alia, Francis Pettygrove, el ŝtato Maine, kie ekzistas urbo nomata Portland. Pettygrove, kiu tiam posedis kelkcent akrojn de tero en la regiono, kie nun staras oregona Portland, gajnis la ludon kaj rememorante sian hejmon baptis la urbon.

Portland, la plej granda urbo en ŝtato Oregon, situas ĉe la kunfluejo de riveroj Willamette kaj Columbia, 110 mejlojn (176 km) persipe de la Pacifika Oceano kaj 700 mejlojn (1120 km) norde de San Francisco. En la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo vivas proksimume 1 000 000 homoj. Kvankam oni distingas inter la kvar jarsezonoj, la klimatsanĝoj estas laŭgradaj kaj tre mildaj. Malofte estas tro varme aŭ tro malvarme, kaj neniam estas tro seke. Meza temperaturo en somero oscilas inter 20 kaj 25° C.

En la urbo ekzistas pli ol cent parkoj. Du el ili aparte menciindas: la



Hotelo Hilton — La Kongresejo.

Internacia Rozĝardeno, de kie malfermiĝas impona elrigardo super la urbon, kaj la Provgardeno de rododendroj kaj azaleoj, kiu kuŝas en alloga arbareto kaj kie oni kulturas mondreputacian varion de la vegetaĵoj. La zoologia ĝardeno, ĝisdata koncerne komforton por la bestoj, kaj kun miniaturaj trajnoj trafikantaj la terenon proponas amuzan viziton kaj al infanoj kaj al pliaĝuloj.

Alia parko de monto Tabor situas ĉe estingiginta vulkano kaj enhavas tri rezervujojn da pura trinkakvo, envenanta de malgranda monta rivereto Bull Run.

Proksimume ĉiun kvinan horon eniras la havenon de Portland oceana ŝipo por liveri aŭ ricevi kargon. Signifan gravecon en la internacia ŝiptrafiko dankas Portland al sia strategia situo kaj abundo de naturaj fontoj en la regiono. La markomercio estas la dua plej vigla sur la pacifika bordo (post Los Angeles). Plej kvantaj komercaĵoj estas greno, segligno, ŝtipoj, papero, faruno, legomoj kaj fruktoj, kiuj ankaŭ difinas la industrion de la urbo kaj de la tuta ŝtato. Portland estas unu el la elstaraj centroj de Usono rilate al kunvenoj kaj kongresoj. Ĉiujare la urbo akceptas 300 tiajn aranĝojn kun ĉeesto de proksimume 200 mil personoj. La butikcentro Lloyd en la koro de la urbo estas laŭdire la plej vasta en tuta Usono; tie estas solvita la problemego pri aŭto-parkado: 8 000 parklokoj uzataj ĉiutage de 10 ĝis 30 mil aŭtomobiloj. Tamen, neniuj veturilo ĝenas la ĉiutagajn dudek-ĝis-sepdek mil vizitantojn en sentrafikaj promenstratoj kaj multfloraj korsoj inter pli ol cent magazenoj de la Centro.

La artmuzeo de Portland posedas unikan kolekton de artaĵoj de la nordokcidentaj indianoj. Ankaŭ la Muzeo pri Scienco kaj Industrio ekspozicias interesajn eĉ kuriozajn vidaĵojn. La japanaj ĝardenoj imitas aŭtentan stilon kaj montras la rilaton de Port-



land kun sia ĝemel-urbo Sapporo en Japanujo.

Oni projektas ĉ. 80-km-an "Scenic Parkway Drive" — ŝoseon, kiu preferiros multajn belajn vidindaĵojn de la urbo. La sanktejo de Nia Patrino skulptita el la solida roko ĝuas naturan belecon kaj pacan solecon nur je malgranda distanco de la urbocentro. En la apuda groto staras kopio de la fama "Pietà" de Michelangelo.

En la urba ĉirkaŭaĵo estas nepraj vizitindaĵoj kiel ekzemple la monto Hood, la plej alta pinto en Oregon. De ĝia supro prezentigas neforgesebla panoramo. Inda je vido, ofertas imponan travivaĵon ankaŭ la mondfama kanjono de la rivero Columbia, kaj la akvofalo Multnumah, la dua plej alta en Usono. La ponton de St. Johns trans la rivero Willamette en la nordokcidenta angulo de la urbo la ekspertoj listigas inter la sep plej belaj en la mondo. Mirindan rigardon donas la frajantaj salmoj sur fiŝeskaloj de la akvobaraĵo Bonneville. La regiono plie proponas ekskursojn al rava pacifika strando, pejzaĝo kun grandkreskaj abioj kaj al multaj aliaj superlativaj vidindaĵoj.

Portland, la urbo de la rozoj, bonvenigas vin!

Brevmärke - Portland

Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40

3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).


DAKA-ROMA DEVENO DE L'RUMANA POPOLO

AMO

De George MACOVESCU

*Iam, vi krucumis min
Homoj, ho mia fratar'
Maldekstre
La templon de mensog'
Alten levante,
Kaj dekstre
Tiun de malam'.
Kaj min vi suprenpendigis
Kiel rabiston.
Sed mi vin amas
Homoj, ho miaj fratoj!
Vi scias knedi la teron
Intermiksi ĝin kun larmoj kaj suno
Kaj veante pro dolor'
Naskas vi per viaj manoj
La panon, nian ĉiutagan panon.
Vi scias estri la venton
Kaj fari ke ĝi kantu por ni.
Vi povas dishaki la ŝtonon
Kaj skulpti bildon el ĝi
Pli belan ol tiuj kiujn donacis
al ni la naturo
Nia patrino.
Jen pro kio de tie, el la altoj
El la templo de mensog', kaj malam',
Batita kaj surkraĉita de vi
Mi amas vin senĉese
Homoj, ho mia fratar'!*

Tradukita el la rumana:
de **Eugenia Morariu**
Aperis en la revuo "CON-
TEMPORANUL" (Bucuresti)
Nr. 32/1139, 10. aŭg. 1968



Pri ĉi tiu temo traktis pli frua artikolo de Tib. Morariu en "La Espero", verkita surbaze de verko de rumana profesoro pri historio ĉe la Universitato en Bukureŝto, **Giurescu**.

En la decembra numero (jaro 1971) T.M. kompilis artikolon pri la "Popola kulturo rumana" laŭ la verkoj de svedaj profesoroj **Bolinder** k. **Lombard** pruvante samfontan devenon dakan-roman.

Bedaŭrinde pro spaco-manko ni ne povis pli frue redoni tri ilustraĵojn, kiuj kontribuas al la historia dokumentado pri pratempa origino:

Maldekstre: **Daka kamparano** (comatus) unu el militkaptitoj de la roma imperiestro Trajano, kiu venkis la dakojn de sub la estreco de Decebal, kaj venigis i.a. ĉi kaptiton al Romo. (Bronza busto en la Muzeo de Vatikano).

Sube: nobela dako (pileatus), alia militkaptito portita al Romo. (Bronza busto en la Muzeo de Napoli).



Dekstre: el Transilvanio (desegno de Hering en 1838). La aspekto de la kamparano similas al tiu de la "pileato" (nobela dako),

*

Kiel ni scias, la romaj legionistoj fondis kolonion en Dakio, edziĝis al dakaj virinoj. Jene naskiĝis la daka-roma popolo, kiu poste ricevis la nomon = r u m a n o j . Ĉi popolo poste alprenis la pli altan roman kulturon. Kun la kulturo ankaŭ la **latinan lingvon**. Tamen restis ĝis hodiaŭ pluraj **dakaj esprimoj**, precipe pri agrikulturo, praprofesio daka.



HELSINGÖR 1972


La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos en La Internacia Altlernejo de Helsingör (tute moderna) dum la semajno **23—30 de julio** (tuj antaŭ Frostavallen). Venu por ĝui vere interesan ferio-semajnon inter samideanoj el multaj landoj!

Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando



Amikeco trans limoj

La semajno de internacia amikeco — den internacionella venskapers vecka — infaller i år 20—27 februari och bör uppmärksammas av alla esperantister.

Föreningarna bör lämpligen anordna en festlig sammankomst med något program i anslutning till temat för veckan: vänskap över gränserna. Där möjlighet finns kan man också anordna någon offentlig sammankomst, eller en sammankomst i samarbete med andra organisationer och speciellt inbjudna.

Enskilda esperantister, som har vänner i andra länder — och det har de flesta — bör höra av sig, åtminstone med en kort hälsning på ett brevkort.

I år finns även brevmärken att sätta på kuvert eller kort. Pris 60 öre per ark om 6 st. (inkl. moms). Utan tidsangivelse, men bör användas **endast** i samband med vänskapsveckan.

ALVOKO AL ESPERANTISTOJ- TURISTOJ

Ciuj esperantistoj en la tuta mondo, kiuj intencas viziti Munkenon kaj la Olimpiajn Ludojn 1972, estas petataj anonci sin jam nun, laŭeble tuj, ĉe

**S-ro Horst Spirat,
Esperanto-Grupo
8 München 2,
Arnulfstr. 22/4**

per poŝtkarto aŭ letero kun la informo, kiam li aŭ ŝi venos al Munkeno aŭ intencas veni. Oni intencas dum la daŭro de la Olimpiaj Ludoj starigi konstantan renkontejon de esperantistoj en Munkeno!

Dessutom postkort, 40 öre/st. för större format, 20 öre för mindre.

Det finns också affischer (för butiker etc.) till 11 öre st.

Beställes hos

Siftelsen AMIKECO TRANS LIMOJ (ATL)

S-690 60 Hällabrottet.

Postgiro 14 32 10.

En sia vere interesa libro "Mi serĉis oron kaj oleon..." David Flood rakontas epizodon el Usono pri la rilato blankuloj — negroj tie.

"Kiel mi jam menciis, mi ankaŭ laboris kune kun negroj. Mi ne povas ne karakterizi ilin bonegaj homoj. Ili havas primitivan sed neelĉerpeblan bonhumoron. Mi devas rakonti la historion pri la negro Tom kiu regule ĉiudimanche vizitis iun preĝejon en la urbo, kie li loĝis. Iun tagon Tom kaptis kuraĝon kaj demandis la pastron ĉu li ne povus fariĝi membro de la eklezio. La pastro eble rigardis tion ne tute kristaneca, se li rifuzus la kompatindan negron per bruska neo. Anstataŭe li admonis lin tute diplomate iri hejmen kaj demandi konsilon de Dio.

— Se Dio diros ke vi rajtas iĝi membro de nia eklezio, vi estos bona, la pastro certigis.

Tom iris kaj poste li ne plu revenis al la preĝejo. Post iom da tempo la pastro renkontis lin surstrate kaj demandis kian konsilon Tom ricevis de Dio.

— Ne koleriĝu, Tom petis, sed Dio klarigis ke li mem dum pli ol dudek jaroj provis fariĝi membro de tiu eklezio sen sukceso. Kaj tial li kredis ke ankaŭ mi ne havas ŝancon."

MANUEL DE SEABRA:

Kialo

*Pri la talentaj homoj sentalentaj?
Floroj kaj skorpioj,
stufitaj angiloj
("patro de civilizacio?")
estas la Kolono, jes.*

*Meng K'e: 'Konfuceo trovis
malfacilaĵojn
en la regionoj de Ch'en kaj Ts'ai
nur ĉar li ne havis amikojn en la
kortego.'*

*Kaj pli: 'Se la tirano de Ch'i falos,
kun li falos ĉiuj liaj malamikoj,
ĉar nur tiam ilia maltalento
riveligos.'*



*Ĉar la vera malamiko de la talenta homo
ne estas la Reĝo de Ch'i aŭ de Chu
nek la stultuloj,
sed la talenta homo sentalenta.
'Kion tio signifas?' demandis Kung-sun
Ch'ou.*

ĈU

*Post jaroj perditaj en la dezerto
tra multaj oazoj
fine alvenis al Tripolo
la taglibro de Gordon Laing
(ŝparita de la araba respekto al la
skribita vorto).*

*Lao Tung Pao uzis oldajn ĵurnalojn
por surpaperigi siajn silkerajpajn pletojn
(ĉu tiu malrespekto al la skribita vorto
kulpis pri la malbona rikolto?)*

*Kial ne estas tie ĉi Cha-no-yu
nek oni konas la sonon de unu sola
mano?*

Glosoj

Lao Tung Pao — persono el novelo de la ĉina verkisto Mao Tun.

Cha-no-yu — la japana teceremonio. Sono de unu sola mano — temo de fama zena koano. Aŭskulti la sonon de unu sola mano egalas kompletan iluminigon.

Koano — nomo de la problemoj, kiujn la zenaj majstroj uzas por gvidi siajn studentojn al iluminigo.

STIPENDIUM

Halmstads Esperantoklubb ställer 700 kr. till förfogande för ungdomar, som under 1972 deltagar i något esperantoarrangemang i Sverige eller utomlands. Ansökan senast 15 mars till Halmstads Esperantoklubb, Arne Andersson, Bismarksgatan 3, 302 33 Halmstad.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso:

Fack
200 42 Malmö 7
Svedujo
Poŝtgira konto 578-5

Prezlisto 1972

	broŝ.	bind.
	Sv. kr.	
PROPRAJ ELDONAĴOJ		
Beletro kaj biografioj		
EKSPEDICIO KON-TIKI T. Heyerdahl, (S. Brynildsen, S. Engholm), 208 p. il.	—	25:—
JAROJ SUR TERO orig. Sinha, 128 p. il.	12:—	16:—
MALSATA ŜTONO R. Tagore (L. Sinha, 128 p. il.	—	20:—
LA NORMANDAJ RAKONTOJ G. de Maupassant (R. Dupuis), 212 p. il.	—	22:—
ISLANDAJ PRAVOĈOJ Baldur Ragnarsson), 110 p. ...	7: 50	10:—
TRA LANDO DE INDIANOJ T. Sekelj (E. Sonnenfeld), 186 p.	24:—	30:—
LA GRANDA AVENTURO orig. F. Szilágyi, 114 p.	7: 50	10:—
VIVO VOKAS orig. S. Engholm, 180 p.	7: 50	10:—
MI SERĈIS ORON D. Flood (K. Gustafsson), 132 p.	7: 50	10:—
PRINTEMPO DE MORTO L. Zilahy (L. Somlai), 120 p.	7: 50	10:—
INTER SUDO KAJ NORDO orig. F. Szilágyi, 185 p.	—	10:—
ŜIPESTRO RAKONTAS orig. F. T. Lundqvist, 76 p.	7: 50	10:—
KREDO FLOROJ DINAMITO orig. E. Olsson, G. Henriks- son, 80 p.	7: 50	10:—
BONA RIDO orig. A. Helm, 86 p.	7: 50	—
SVEDA POEMARO (M. Carlsson), 112 p.	—	6:—
LA KONSCIENCO RIPROĈAS Aug. Strindberg (G. H. Back- man), 60 p.	2:—	—
PASKO Aug. Strindberg (S. Engholm), 88 p.	2:—	—
VIVU LA STEL' (kantlibro), 64 p.	2:—	—

Vortaroj kaj lernolibroj

	broŝ.	bind.
	Sv. kr.	
ALLAS ANDRA SPRÄK E. Malmgren, 128 p.	8:—	—
ESPERANTOKURS F. Lindén, 276 p.	—	9:—
SVENSK—ESP. GRAMMATIK E. Carlén	—	15:—
KORRESPONDERA MED HELA VÄRLDEN	2:—	—
SVENSK ESPERANTISK ORDBOK. S. Jansson, 576 p.	18:—	—
ESPERANTO SVENSK ORDBOK. P. Nylén, 268 p.	—	16:—
LILLA ORDBOKEN (sv.—esp., esp.—sv.) E. Vilborg, 228 p.	—	12:—
NYCKEL TILL ESPERANTO	0: 50	—
KONSTRUKTEKNIKA TERMINARO K. J. Moberg, 100 p.	7: 50	—

Esperanta movado kaj lingvo

EL LA VIVO DE ZAMENHOF G. Henriksson	2: 75	—
50 JAROJN KUN PAUL NYLÉN J. Strönné, 64 p. il.	5:—	—
ENKETO PRI INTERNACIA LINGVO. P. Bovet, 32 p. ...	2:—	—

Legolibroj

ESPERANTO-KURSO V. Setälä, 48 p.	2:—	—
KVARA RAPSODIO F. Szilágyi, 48 p.	2:—	—
LINGVA KVARONHORO P. Nylén, 48 p.	2:—	—

Ni liveras sub samaj kondiĉoj kiel niaj propraj

BURĜONOJ V. Setälä, 80 p.	—	6:—
SEP FRATOJ A. Kivi (V. Setälä), 360 p. ...	6:—	10:—
KREDO AL DIO EN LA ATOM- EPOKO. G. Lundberg (E. Carlén), 46 p.	4: 75	—

La prezoj estas sen eventualaj diverslandaj naciaj impostoj.

LARMOJ SUR ROKOFLANKO

De Gösta Rosenberg

La boato sur la golfo malrapide alproksimiĝis la marbordon, kaj la ŝipano, du viroj kaj unu virino, saltis surteren. Ili tiris la boaton sur sekan lokon, kaj poste ili komencis malŝarĝi ĝin.

La tereno laŭlonge de la marbordo estis ebena, vere plena de arboj kaj ŝtonoj tie kaj ĉi tie, sed ili tamen baldaŭ trovis konvenan lokon por kuŝejo, kaj ili tuj komencis konstrui la malgrandan dometon, kiu ili laŭ la ĉiama kutimo de sia tribo faris ĉie ajn, kien ili venis dum la malvarma sezono, kaj dum la tempo, kiam tio daŭris, la virino faris fajron en fosaĵo. Ŝi estis maljuneta sed lerte plenumis sian taskon, kaj kiam la viroj pretiĝis la dometon, ŝi invitis ilin ĉe la fajro.

La dometo havis nur tri vandojn. Ĉe la senvanda flanko estis la fajro, kaj la viroj sidis inter la fajro kaj la dometo, kun la dorso kontraŭ la interno de la dometo, parolante kaj atendente, ke la rostaĵo estu preta. Ili diskutis, kaj la plej aĝa, kiu havis tute blankan hararon, diris:

"Mi opinias, ke ni devas tranokti en la boato sur la akvo iomete for de la bordo. Se ni restos ĉi tie, la monstroj atakos nin, kaj ni eble estos tro malmultaj por venki."

La pli juna — li estis forta, bela blondulo — respondis:

"Mi pensas, ke ili ne estas tiel multaj nuntempe, ĉar same kiel aliaj homoj, ili suferis dum la du pasintaj vintroj. Ni povas dormi sendanĝere ĉi tie, se unu el ni staros garde."

"Ne nomu ilin homoj, ĉar ili estas bestoj! Ĉu vi ne aŭskultis ilin? Ili ne povas formi verajn vortojn, kaj ilia parolo ne venas el la buŝo, kiel la nia, sed el la gorĝo. Tial ili estas bestoj, kaj oni povas utiligi ilin kiel servistojn aŭ mortigi ilin."

La pli juna respondis:

"Mi kredas, ke ili estas homoj, sed ili ne estas tiel bone edukitaj kiel ni."

La virino miksis sin en la babildon:

"Mi opinias, ke ili estas bestoj. Ĉu vi ne rimarkis, ke ili ne povas rektigi siajn gambojn, kiam ili staras? Kaj ili ne kuras, ne, ili trotetas, kiam ili volas rapidi."

Sed la maljunulo respondis:

"Jes, mi scias, sed tio, kion oni malplej povas elteni, estas la sono de ilia lingvo. Tiel malbelaj sonoj neniam aŭdiĝis en ĉi tiu mondo, antaŭ ol ili venis ĉi tien."

La virino daŭrigis:

"Jes, vi pravas. Kaj ĉar ili elparolas tiajn malbelajn, abomenindajn

vortojn, ili devas esti sorĉistoj aŭ monstroj de iu speco. Ili estas danĝeraj por ni, kaj ni devas forpeli aŭ ekstermi ilin."

La maljunulo kapjesis kaj diris:

"Jes, estas vere. Ni devas forigi, ilin. Ĉu ne?"

Li direktis sian demandon al la junulo, sed ĉi, tiu evidente pensis pri io alia, ĉar li balancis la kapon kaj murmuris.

Antaŭ la groto supre sur la monto svelta virino kun sulkita vizaĝo zorgis observis ĉion. Ŝi vidis ankaŭ, ke la alvenintoj konstruis dometon kaj aranĝis fajron antaŭ ĝi, kaj ŝi preskaŭ sentis la odoron de kuirata viando — la vento alportis la odoron al ŝia nazo.

Ŝi turnis sin kaj rigardis la interon de la groto malantaŭ si. Tie estis mallume — estis je la mezo de la tago, sed la groto estis profunda, kaj la sunradioj atingis nur la eksternan parton de ĝi. Ŝi povis tamen distingi tri figurojn: tri infanojn, nome dekjaran knabinon kaj du knabojn ses kaj trijarajn.

La knabino ekvidis ŝin tuj kaj etendis siajn maldikajn manojn al ŝi, malforte kriante:

"Mangon, patrino!"

Ŝi preskaŭ ne povis movi sin; ŝi nur levis sin sur la genuojn kaj montris la manojn, dum la knaboj per siaj vizaĝoj klopodis esprimi sian deziro, kiun la patrino tre bone komprenis:

"Donu al ni ion mangi, ni mortas!"

La patrino tremis, kaj evidente ŝi trovis la situacion neeltenebla. Ŝi forte prenis la knabinon, karesis ŝin, kisis ŝin kaj diris al ŝi:

"Mi volas iri por serĉi mangon por vi. Promesu, ke vi gardos la fajron dum mia foresto!"

La knabino ĝemetis, kaj la patrino alprenis kelkajn malpezajn pecojn da ligno kaj metis ilin ĉe la infano. La fajro baris la enirejon, kaj se la knabino nur ne forgesos la fajron, tiam la sovaĝaj bestoj certe ne kuraĝos eniri kaj mortigi la infanojn.

La virino — malpura, brunhaŭta, per ursa felo vestita sovaĝulino — prenis ŝtonhakilon kaj formarsis. Ŝi estis naskita en la sovaĝejo, kaj ŝi neniam travivis tagon sen danĝero kaj timo. Ŝia vizaĝo similis al la rokoj ĉe la marbordo: malmolaj, krevitaj, fortikaj, kiuj ne ŝanĝis sian aspekton, eĉ kiam torentoj da pluvo kaj neĝo atakis ilin. Kiel ili: la sovaĝulino ridis neniam.

Ŝi sekvis la randon de la arbaro, ĝis ŝi atingis lokon kun mallarĝa, alta roko. Tie ŝi komencis iri pli malrapide. Singarde ŝi antaŭenmarŝis, rigardante ĉiujn flankojn kaj firme tenante la ŝtonhakilon, kvazaŭ ŝi atendus malamikojn ĉiun ajn momenton. Kaj ŝi kondukis tiel pro teruro, ĉar

ĉi tiu estis ĝuste la loko, kie antaŭ dek tagoj ŝia edzo estis mortigita de la tribo "La Verdaj Ŝildoj".

"La Verdaj Ŝildoj", estis la nomo, kiun ŝia edzo donis al tiu tribo longe antaŭ ŝia morto. Tiel li nomis ĝin, ĉar la membroj havis verdajn ŝildojn. Kiel la tribo nomis sin mem, li ne sciis, ĉar li ne komprenis la lingvon de tiuj homoj. Ili parolis tute nekompreneble; kaj sekve ili estis malamikoj. Ĉar ili ne povis elparoli verajn, kompreneblajn vortojn, oni povis ja kompreni, ke ili estas malbonaj estaĵoj, kiuj scias nenion pri bonfaro kaj amikeco, kaj tial oni devas forigi ilin el la mondo. Tiel provis fari la edzo de la sovaĝulino, sed malfeliĉe li estis venkata dum batalo ĝuste ĉi tie. Eble la spirito de ŝia edzo aŭ de iu el liaj mortigitaj kontraŭuloj kutimis viziti ĉi tiun lokon — oni ne povas scii ion pri tiaj aferoj, kaj tial ŝi kondukis tiel singarde.

Ŝi atingis fine la marbordon kaj alproksimiĝis ŝtelrampe la lokon, kie la fremdulo nun kuŝis mangante ĉirkaŭ la fajro. Ŝi kaŝis sin malantaŭ arbo kun densa branĉaro, kaj ŝi rigardis ĉion malsate.

La malsata, mizera virino cerbumis: kiel fari por konkuri ĉi tiun mangaĵon? Ŝi estis sola kaj ne bone ekzercita en la uzo de armiloj; tiuj homoj estis du fortaj viroj, kaj ŝi komprenis, ke estas neeble venki ilin. Do ŝi devis utiligi ruzon. Nun la viroj mangis kaj ne atentis la ĉirkaŭaĵon.

Ŝi forlasis la kaŝejon nerimarkite, kaj dum longa tempo ŝi vagadis en la arbaro laŭlonge de la marbordo, ne sciante kion fari. Ŝi devis ja nepre eltrovi ion por la infanoj; ili kuŝis en la groto kaj malsatis. Depost la morto de ilia patro neniu portis mangaĵon al ili, eĉ ŝi mem ne kuraĝis foriri el la groto, sed nun ŝi devis fari lastan, grandan klopodon por savi ilin.

Subite ŝi ekvidis inter la arboj du cervojn, kiuj staris tie, evidente serĉante ion, kion ili povu mangi. Ili tuj vekis la intereson de la sovaĝulino, kaj ŝia cerbo komencis labori.

Ŝi iris kontraŭ la bestojn, kaj kiam ŝi ekvidis, ke ili havas grandajn, sveltajn korpojn kun akraj kornoj, ŝi sentis timon en sia interno. Se nur ĉio estus normala, ŝi turnus sin por fuĝi; sed nun ŝi vidis antaŭ si la vizaĝojn de la malgrandaj infanoj, kaj kun ĝemo en sia interno ŝi reprenis la kuraĝon, kaj kvazaŭ sovaĝa rabobesto ŝi subite kriis kaj atakis la cervojn. Surprizitaj ili turnis la dorson al ŝi kaj kuris malsupren laŭ la deklivo. Ili ekhavis tian rapidecon pro la kruteco de la deklivo, ke ili preskaŭ falis malsupren. Tute ekster si pro timo ili eligis krion, kiu estis aŭdebla ĉie en la ĉirkaŭaĵo.

(Daŭrigo sekvos)

**50.000 KRONOR TILL
ESPERANTOLITTERATUR
FÖR GÖTEBORGS
ESPERANTISTER**

En av ABF-klubbens medlemmar, förre textilarbetaren Sigfrid Nilsson, testamenterade vid sin bortgång för tolv år sedan en betydande summa pengar avseende inköp av god esperantolitteratur. Egentligen avsåg testator att hela hans kvarlåtenskap skulle gå till detta ändamål. Men för att inte nödgas göra rättssak enades man om att dela upp tillgångarna på tre lika delar: den avlidnes syskon, en mångårig fästmo och hushållerska samt esperantisterna.

På grund av en tidsödande avveckling av boutredningen — det gällde tomtmark och vissa fastigheter — är man först nu framme vid avslutningen, och man räknar då med en behållning på omkr. 50.000 kr. per del.

Att förvalta den testamentariskt utgående delen har uppdragits åt Esperanto-Alliansen. Självfallet har många goda råd getts hur man bäst skulle använda pengarna. Men det är i stort sett onödiga bekymmer. Testator har på ett framsynt sätt lagt upp linjerna vi har att följa. För Nilsson var litteraturen något väsentligt och därför gjorde handena satsning. Det var naturligtvis för att ge donationen ett bestående värde som det i testamentet heter att donationen får anlitas först när den motsvarar 50.000 kr. i 1955 års realvärde. Likaledes får ränteavkastningen tas i anspråk för litteraturinköp först då fonden är uppe i nyssnämnda realvärde. Intill dess så skett tillföres den upplupna och utgående ränteinkomster. Första dellikviden gjordes 1960.

Därmed står det klart att vi i Göteborg inom en ej alltför avlägsen

framtid får resurser att åstadkomma ett esperantobibliotek som bör få stor betydelse. Att sedan räkna med en årlig ränteavkastning av 4.000—5.000 kr. i dagens realvärde för kontinuerliga bokköp inger berättigad tillförsikt.

Erik Ekström

★

Si — Kiam ni estos edziĝintaj, tiam mi dividos viajn zorgojn kaj ĉagrenojn.

Li — Mi ne havas zorgojn kaj ĉagrenojn.

Si — Mi diris, kiam ni estos edziĝintaj...

Du har väl inte glömt

**ESPERANTO-
NYTT**

SEF:s fyrasidiga informationsblad. Utkommer en gång i kvartalet. Kortfattad. Välredigerad. Lämpar sig för spridning bland politiker, skolfolk, bibliotek etc.

Pris: 1: — kr per år.

Adress: Voxnegränd 24,

121 60 Johanneshov.

Postgiro 20 65 88

SENPAGE

vi ricevas en ĉiu poŝtoŝeĵo la blankedon numero 2050.05, kiun vi senpage povas sendi al ni, sciigante nin pri via nova adreso, se vi translokigis, aŭ pri eraĵoj rilate al nia adresado de via gazeto.

**SVEDA
ESPERANTO-
FEDERACIO**

VÄNSKAPSVECKAN

Varför inte ge Dina vänner en god bok? — Kan utan svårighet sändas till de flesta länder.

Här några förslag:

David Flood:

MI SERĈIS ORON...

Häft. 8: 85, inb. 11: 80

Magda Carlsson:

SVEDA POEMARO

Inb. 7: 50

Tibor Sekelj:

TRA LANDO DE INDIANOJ

Häft. 28: 25, inb. 35: 30

Alla priser inkl. moms.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

— Kial vi ne prenas vivasekuron?

— Ne, mi ne eltenas la penson esti pli valora morta ol viva.

★

KORESPONDI DEZIRAS

40-jara estona instruistino deziras praktiki Esperanton kaj interŝangi bildkartojn, poŝtmarkojn k. t. p.

S-ino Milvi Muurisepp, Paidestr. 11, 202 300 TAMSALU, Estonio, SSR.

LETERVESPERO

en februaro, en la kadro de SIA. Ĉiuj kontribuajoj bonvenaj. Ĉiu kontribuanto ricevos bildkarton pri 700-jara urbo GYÖR.

"Verda Stelo" Esperanto-Grupo, Poŝtkesto 228, GYÖR 2, Hungario.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

57-a
UNIVERSALA KONGRESO
de Esperanto



29 juli—5 augusti 1972
PORTLAND (Oregon) USA

blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Pe-ranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Hol-land eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/3 1972	Till 20/6 1972	Efter 20/6 1972
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	165:—	180:—	218:—
2. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	143:—	158:—	195:—
3. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	120:—	135:—	173:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	116:—	126:—	164:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	100:—	111:—	148:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	50:—	54:—	92:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	83:—	90:—	128:—
8. Blindul(in)o	66:—	72:—	110:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalogen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingpremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen.

Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enske.

Ĉefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv.kr. (postĉeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanono: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enske. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lillsvägen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skrabaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578.

★

Administranto: Anna-Greta Ströme

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78